

EKO 2021

Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok
jaroj, de post 2013

2020: rekorda jaro:
kun 60 komunikoj

Subtene al la loka,
landa, faka kaj
regiona agado

EKO 2021-29 sendita el Budapeŝto la 23an de julio

Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

Emfazindas la kompleta interkomunika sperto

Jen la mesaĝo de la interveno de D-ro Duncan Charters, prezidanto de UEA, al la 74a Seminario pri Aktivula Maturigo. Li parolis libere tra 50 minutoj prezentante spertojn kaj memorojn el sia periodo de Eo-lernado kaj uzado. El tio li tiris kernajn mesaĝojn. Niaj planoj devas esti pli daŭripovaj. Malsufiĉas instrui nur la lingvon, devas ĉeesti la kultura kunteksto, en kiu ni evoluigu la komunikadajn kapablojn, kio antaŭsupozas la uzon kaj maturigon de interkulturaj spertoj. Gravegas frue en kurso malkovri la interesojn de la kursanoj, kaj plui laŭ tiuj, ne laŭ strikte formulita plano.

Kontribuis la ĝenerala sekretario de UEA, Aleks Kadar (Francio), kun bone formulita listo de bezonoj por sukcesaj Eŭropaj projektoj, Ileana Schröder (Danlando), kiu kuraĝigis al pliaj landoj starigi petojn por projektoj, cele al financado de la Eŭropaj instancoj, Fernando Maia Jr. (Brazilo), vic-prezidanto de UEA, kun novaj informoj pri la kunlaboro inter UEA kaj la alloga evento SES en Slovakio kaj Anna Löwenstein pri la bezono por pli konvenaj formoj de unua kontakto kun la komunumo por kursfinintoj, ekzemple la retejo <UEA.facila.org>.

La partoprenantaro atingis pinton de 46 personoj: el Argentino, Benino, Brazilo, Britio, Ĉinio, Ĉeĥio, Danlando, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Israelo, Italio, Japanio, Kolombio, Kongo DR, Koreio, Meksiko, Mongolio, Nederlando, Norvegio, Rusio, Serbio, Svislando, Tajvano (Ĉinio), Ukrainio kaj Usono. Sume, el 27 landoj. Dekkvino da homoj diskutis aŭ salutis.

Post prezento de la enkonduko, vaste dissendita, apud la fino de la trihora sesio, la patro de AMO, Stefan MacGill, prezentis novan proponon por ligi kursfinintojn iel al la komunumo. Tion en la 21a de julio traktis la Eŭropa Komisiono ene de VK2 sub la gvido de Renato Corsetti, kiu plusekve aktivis ankaŭ en AMO 74. Ni alkroĉas tiun dokumenton, jam modifitan pro la bonaj ideoj el AMO 74. Pro la seminario la komisiono ricevis kelkajn novajn ideojn, al kiuj ĝi revenos fine de la kongresa periodo. Io konkreta rezultos!



74

Plia multlingva afiŝo – Indiĝenaj lingvoj

Frue en aŭgusto okazos la Tago de Indiĝenaj Lingvoj, kadre de pli vasta kampanjo de Unuiĝintaj Nacioj. UEA subtenas tion, rekonante la valoron kaj ekzistorajton de multlingva mondo.

Kadre de VEKI 2, la virtuala Kongreso de ILEI, granda debato okazos la 9-an de aŭgusto pri tiu temo.

Disiris tra la kutimaj kanaloj petoj por ricevi nacilingvaj tradukojn de la dudeko da vortoj sur la afiŝo

Jam ekzistas versioj en Esperanto, la finna, germana, hispana, portugala, rumana, slovena, sveda kaj turka:

<https://i.getspace.eu/cloud/index.php/s/MPETo3GExBZNgyF?path=%2FINDIGENAJ%20LINGVOJ-2021>

Ili aperas en diversaj formatoj kaj pezaj, pretaj por elŝuto kaj uzo en gazetaraj komunikoj, naciaj bultenoj kaj uzado en sociaj medioj.

Aparte petata estas versioj en la franca kaj la ĉina – sendube sekvos.

Kiu volas krei tradukojn por pliaj lingvoj, sendu la rezultojn al Renato Corsetti, kiu aktive laboras pri ZPI, la grupo 'Zorgantoj pri Informado', kiu havas agantojn en ĉiam kreskanta nombro da landoj.

Medicinistoj modernigas sin

La 116-a numero de la *Medicina Internacia Revuo* (MIR) estis preparita uzante la aĉetitan de Farmacia Fakultato de Medicina Kolegio de Jagelona Univeristato novan version de la komputila programo QuarkXPress, kiu ebligas plibonigi la eldonkvaliton de la menciita revuo. En la plejlasta numero de MIR aperas artikoloj prezentitaj dum la 21-a Kongreso de UMEA: IMEK. UMEA informas, ke la 22-a IMEK denove okazos en la urbo Hódmezővásárhely (Hungario) kaj Szeged en julio 2022. La kunorganizanto de la 22-a IMEK estos Farmacia Fakultato de la Medicina Universitato en Szeged sub gvido de Dekano Prof. Dr habil. István Zupkó kaj Vic-dekano prof. dr habil. Zsolt Szakonyi. Pri la scienca programo de tiu ĉi grava kunveno estis decidite dum vizito de oficiala delegacio de Farmacia Fakultato de Medicina Kolegio de Jagelona Universitato (Pollando) prof. Dr habil.



En oficialaj rilatoj kun UN kaj UNESKO

Internacia
TAGO de
**INDIĜENAJ
LINGVOJ**

9-a de aŭgusto, 2021

Indiĝenaj lingvoj
kaj la internacia lingvo **Esperanto**
por lingvaj rajtoj

Pri lingvoj: www.lingvo.info
Pri interreta komunikado: www.esperanto.net | www.uea.org

Bożena Muszyńska, Dr. Agata Kryczyk-Poprawa kaj Prof. Dr hab. Włodzimierz Opoka dum renkontiĝo en Szeged kun Dekano Prof. Dr habil. István Zupkó kaj Vic-Dekano Zsolt Szakonyi la 5-an de julio 2021. La proponitaj ĉeftemoj de la 22-a IMEK estas: ‘La novaj eblecoj de diagnozado kaj kuracado de civilizaciaj malsanoj’ kaj ‘La metodo de Masayuki Sajonji – historio kaj nuna stato’. En la sama tago la pola delegacio renkontiĝis kun urbestro de la urbo Hódmezővásárhely Dr. Péter Márki-Zay (Hungary), kiu promesis sian helpon.

En la 22-a IMEK partoprenos Honora Prezidanto de UMEA D-ro Imre Ferenczy kaj aktuala Prezidanto de UMEA D-ro Christoph Klawe, kiuj invitas prelegojn en Esperanto kaj ankaŭ en la angla, hungara kaj pola lingvoj.

Burunda informilo: ZPI pioniras

La grupo ZPI (Zorgantoj pri Informado) konstante kreskas per aldono de novaj aktivuloj, sed disponigas rimedojn tutmonde. Jen la pruvo. La unua paĝo el la dupaĝa baza varbilo por Esperanto. Jen kiel la Eo-komunumo subtenas indiĝenajn kaj malpli parolatajn lingvojn! Por fari tion, UEA kaj ZPI mobilizas nian tutmondan komunumon por kunlabori en praktikaj projektoj.

ESPERANTO

- muri make: ururimi
rushimishije, umuco
n'ubutungane nu rurimi
rusangi.

© Ĥavas aliĝintaj asocioj por instruistoj (IIT),
medicinistoj (UMEA), fervojistoj (FET), komercistoj (KEEF),
sciencistoj (SKE) kaj lernuloj (LEB).

Universala Esperanto-Asocio
en oficialaj rilatoj kun UN
kaj Unesko

**Association Nationale d'Espéranto
au Burundi « ANEB »**
BP : 170 Rumonge-Burundi
E-mail : apmanikiza@gmail.com
Tel : +257 798 13485
Sjeko social : Quartier Kanyenkoko au Centre
d'Espéranto,
Discipline Ministère : 530/88; du
15/09/2006

ESPERANTO,
monda lingvo, estas
la plej facila lingvo kaj
la plej justa solvo por
protekti la lingvajn
rajtojn de ĉiuj.

===== vortoj: 740 =====

Ĉi tiu komunikilo estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperitaj komunikiloj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis la fino de majo 2021 (per EKO 2021-22). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro de post 2014.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.

**Servo subtenata de
Universala
Esperanto-Asocio
kaj Internacia Ligo
de Esperantistaj
Instruistoj**



**Redaktoroj:
Stefan MacGill kaj
Mirejo Grosjean**

- ENHAVO**
- AMO 74 utilis
 - Indiĝenaj Lingvoj
 - Medicinistoj
 - Bazaj informiloj atingas novajn mondpartojn